



Unum ovile et unus pastor.  
Unu ŝafejo kaj unu paŝtanta.  
(JOH., X, 16.)

# ESPERO KATOLIKA

INTERNACIA MONATA GAZETO, OFICIALA ORGANO de I. K. U. E.

---

## Impresoj de „Nia Tria”.

---

Laŭ mia promeso, kara Redaktoro, mi sendas al vi nur kelkajn personajn impresojn, ricevitaĵojn dum la plensukcesa Tria Katolika Kongreso en Budapeŝto kaj dum nia agrabla vojaĝo veturante al kaj revenante de la Hungaria ĉefurbo.

Akompanata de mia kunfrato Abato kaj Profesoro HUWAERTS, membro de nia Belga Katolika Grupo, mi forlasis Bruselon je la 14-a de Aŭgusto kaj atingis la antikvan urbon Nürnberg la saman tagon vespere. Al la stacidomo atendis nin tri afablaj samideanoj, kiuj antaŭe aranĝis ĉion por ni, luis niajn ĉambrojn en bona hotelo la *Kaiserhof* kaj montris al ni la vojon. Ni Esperanlistoj estas vere felikaj; ni vojaĝis en ĉiuj landoj kiel princoj. Oni preparas por ni loĝejon, renkontas nin al la stacidomo kaj dum nia tuta restado unu aŭ pluaj amikoj estas ĉiam pretaj nin gvidi kaj nin helpi ĉiamaniere. Jen mia sperto de post la jaro 1906, kiam mi komencis vojaĝi per Esperanto. Ne estas oportune paroli nun pri la altinteresa urbo Nürnberg, kie ni restadis dum la tuta Festtago de Nia Sinjorino, 15 de Aŭgusto. Mi nur aldonas, ke en Nürnberg ekzistas kvin

grupoj, kiuj antaŭ ne longe unuiĝis en Federacio. Mi ĉeestis kunvenon de la federacio speciale kunvokata por nin akcepti. Oni voĉdonis por sendi samideanajn salutojn al la membroj de I. K. U. E., kaj al la Belga Ligo, kies vic-Prezidanto mi estas. Je la 16-a ni forveturis frumatene per la fervojo ĝis Passaŭ kaj tiam per la vaporŝipo vojaĝis sur la bela Danubo ĝis Sintz. Mi multe vojaĝis, mi tre ŝatas la bela germana regno, tamen mi devas konfesi, ke neniam mi vidis riveran vidaĵon, kiu egalas la vidaĵon de la bordoj de la Danubo antaŭ Passaŭ kaj Sintz. Oni ĝuas tie la belan sovaĝan naturon. La silento solena, kiu regas dum la tro rapida traĵiro inter montoj tute kovritaj per belegaj arbaroj, kiuj banis siajn branĉojn en la rapidfluanta rivero, estas vere ne forgesebla. Ni ne forgesas la propagandon. Jam dum nia vojaĝo de Bruselo ĝis Nürnberg ni varbis pluajn vojaĝantojn. Ĉiuj el ili promesis lerni nian lingvon. Unu klera pastro el München jam plenumis tiun promeson kaj skribis antaŭ ne longe Esperante. Sur la vaporŝipo ni varbis tutan francan familion kaj havis la plezuron renkonti du samideanojn. En Sintz ni renkontis tre kleran pastron, kiu interesis sin pri Esperanto kaj precipe pri nia katolika movado. Bedaŭrinde li estas la elpensinto de nova internacia lingvo, nomata de li „Perfekt”. Mi jam konatiĝis kun 23 projektoj de internaciaj lingvoj. Ili ĉiuj pretendas ke ili estas perfektaj, tamen estas la unua fojo, ke mi aŭdis pri lingvo, kiu efektive estis nomata „Perfekt”. Mi povas aldoni, ke la tre klera elpensinto tre modeste konfesis, ke li estis ĝis nun la sola parolanto de „Perfekt”. Tio ne mirigis min, ĉar ĝi ŝajnis al mi bela sed tre malfacila lingvo. Almenaŭ tiu modesta pastro donas ekzemplon al la Idistoj, Romanalistroj k.t.p. kiuj fanfaronas pli, sed ne pli bone sukcesas.

La sekvantan tagon ni daŭrigis, ĉiam vaporŝipe, ĝis Vieno, kiun ni atingis je la 7-a vespere. Ĝar la haveno estas tre malproksime de la ĉefurbo, niaj karaj samideanoj de Vieno luis por ni litojn sur la granda vaporŝipo, kiu veturas inter Vieno kaj Budapeŝto. Al nia alveno ni renkontis ses karajn samideanojn, inter aliaj la bonkonata

kaj lerta esperantisto S-ro Schröder, Redaktoro de la „Weltblatt”, kaj korespondanto de nia E. K., kaj la ĉiam-agma S-ro ULM, kiu jam fondis du grupojn katolikajn: la „Fideleco” en Dresdeno kaj la „Verda Stelo” en Vieno. La morgaŭa tago estis Dimanĉo, ni do devis diri la S-tan Meson tre frue, antaŭ la foriro, kiu okazis je la 7-a. Nia Diservo okazis en bela kaj tre proksima Kapelo. Tiu riĉa kaj lukse konstruita Kapelo estas donaco de Lia Moŝto la aŭstria Imperiestro je la memoro de lia mortigita Imperiestrino. Ne estas necese diri, ke ni ne forgesis prezenti la sanktegan Oferon por tiu malfeliĉo Princino.

Dum la vojaĝo ni disdonis multajn propagandilojn, sed ni feliĉe rimarkis, ke en Aŭstrio kaj precipe en Hungarujo Esperanto estas jam tre bone konata. Ĉiu ĝin aprobis kaj ŝatis, nur tiu malfeliĉa homa mallaboremeco prezentas barilon al ĝia disvastiĝo. Multaj respondis: „Jes, la ideo estas bona, sed ni havas jam tiom da lingvoj, kiujn ni devas lerni” Stranga preteksto, ĉar *la* celo de Esperanto estas igi tiun tro grandan laboron ne necesa. Ni tamen renkontis plurajn samideanojn, inter aliaj du pastrojn kaj unu tre kleran Profesoron de Budapeŝto. Ni ankaŭ renkontis tre ĉarman kaj ageman junulon el Estergom, kie loĝas la Princ-Primato de Hungarlando, kiu vojaĝis kun ni al la du Kongresoj, nome la nacia Hungaria, kaj nia Tria Katolika kongreso.

Ni atingis Budapeŝto kaj mia plumo rifuzis priskribi la belecon de la alveno vaporŝipe vespere al tiu mirindega ĉefurbo. La du urboj, Buda kaj Pest, konstruitaj ĉe la ambaŭ flankoj de la larĝa rivero, kies palaco kaj domegoj estis tutiluminitaj per mil elektrikaj lumoj, formis preskaŭ supernaturan vidaĵon, diru ni vidaĵon eltiritan el la „*Mil kaj unu noktoj*” de la Araba rakontaro.

Ĉar mi estis invitita loĝi en la Centra Seminario, anekso de la Universitato, mi ĉe la haveno forlasis Abaton Huwaert, kiu devis loĝi en la Kolegio de S-ta Emeriko.

Aminda estis mia akceptiĝo en la Seminario per Liaj Moŝtoj la Rektoro kaj Vic-Rektoro. Estas por mi antaŭ ĉio devo esprimi al ili kaj al la tuta estraro de la Semi-

nario mian neniam forgeseban dankemon por la agrabla restado, kiun mi pasigis en tiu sankta kaj studema Dom-ego. Dum la semajnoj mi estis la gasto de tiuj kleraj kaj eminentaj Prelatoj kaj Profesoroj. Precipe mi deziras memorigi en nia kara organo Lian Moŝton la Vic-Rektoron Mg-ro D-ro Robitsek. Estas li, kiu precipe rilatis kun mi, tial ke li flue parolas angle. Kvankam li ne ankoraŭ estas Esperantisto, li promesis lerni la lingvon, kaj eĉ antaŭ mia foriro li jam iomete parolis kun mi per ĝi. Tri aliaj Profesoroj ankaŭ akceptis lernolibrojn kaj ŝajnis tutdecid-itaj serioze elstudi ĝin.

#### LA MALFERMO DE „NIA TRIA”.

London, la 19-an de Aŭgusto okazis la unua Diservo en la bela preĝejo de la Universitato. Post la sankta Meso, kiun faris nia kara Prezidanto Mg-ro D-ro GIESSWEIN, predikis tiu bonkonata kaj fervora itala Pastro BIANCHINI. Per elokvantaj vortoj li elmontris la devon de la Katolikoj servigi nian karan lingvon al la gloro de Dio kaj al la savo de la animoj. Ĉar tiu belega prediko aperos en E. K. ne estas necese paroli pli detale pri ĝi. Mi nur aldonas, ke, laŭ mi, la plej granda pruvo ke nia movado plaĉas al Ĉiupova Dio, estas, ke Li sendas al ni pastrojn tiel piajn, tiel sindonemajn kiel Pastro Bianchini. Sed ne estas nur la nobla Italujo, kiu donas al ni siaj plej bonaj filoj. El Irlando venis Pastro PARKER. El Rusujo la klera DOMBROVSKI, k. t. p., ĉar la listo de niaj sindonaj pastroj estus tro longa por povi ĝin doni en tiu-ĉi artikolo. Sed kie mi vidas evidente la agado de Dio, estas je la aliĝo al nia movado de Prelato tiel eminenta, tiel simpatia, kiel la Prezidanto de „Nia Tria” Mg-ro D-ro Giesswein. Efektive la precipa kaŭzo de la mirinda sukceso de la Budapesta kongreso estis sendube ĝia Prezidanto. Ne forgesu, ke Mg-ro Giesswein estas ne nur Prelato bone konata pro sia klereco kaj pieco, sed li estas ankoraŭ unu el la plej amataj kaj popularaj Deputatoj de la Hungara Parlamento kie li reprezentas la potencon partion de la kristanaj Demakratoj. Li estas prezidanto de la „Hungara Ligo de la

Paco”. Unuvorte, preskaŭ nenia bona aŭ sociala agado en Hungarujo ne posedas inter siaj rangoj tiun eminentulon, kies energio ŝajnas preskaŭ senlima. Mi ne povas dubi, ke lia devizo estas tiu de la latina poeto, sed komprenata je senco multe pli nobla: „Homo mi estas kaj nenion homan, mi povas konsideri al mi indiferenta”. Ne estas do mirinde, ke la propono de nia kara konstanta Sekretario Claudius COLAS nomi Mg-ro GIESSWEIN Honora Prezidanto, estis akceptata de la tuta kongreso per entuziasmo tute ne priskribebla.

Mi ne proponas en tiu-ĉi artikolo doni eĉ rezumon de la laborkunsidoj de „Nia Tria”. Plena raporto aperos, kaj sendube ankoraŭ multaj numeroj de nia Oficiala Organo donos raportojn pri ĝi. Dank’ al nia internacia lingvo oni ne perdas momenton da tempo, kaj dum tri aŭ kvar tagoj oni povas fari pli da praktika laboro ol estas eble fari dum unu monato en kongresoj, ĉe kiuj oni devas traduki la paroladojn en kvar aŭ kvin diversaj lingvoj. Sed la rezultado estas, ke la plena raporto de esperantista kongreso estas tre grava kaj longa afero.

Mi nur diras vorteton pri du temoj, kiuj estas tre karaj al mia koro. Unue, la Reunuiĝo de la Kristanaro. Sendube la Eklezio de Kristo estas kaj esence estas unu, sed ni devas malĝoje konfesi, ke la kristanaro t. e. la aro da personoj, kiuj tamen pretendas esti kristanoj, tute ne estas unu. Ni Katolikoj devas do ne nur bedaŭri tion, sed labori kiel eble plej, por ke ekzistu inter kristanoj nur unu ŝaf-ejo kaj unu paŝtisto. Jam en niaj du unuaj Kongresoj en Parizo kaj en Hago, Anglikanaj pastroj kuraĝis ĉeesti kaj laŭte konfesi, ke vera unueco inter kristanoj estus ebla nur per la rekono de la die strarigita centro de Unueco: „la Cathedra Petri”, t. e. la S-ta Roma Seĝo. Dum nia Tria en Budapest, Pastro de la Rito Grek-Katolika, en tre lerta parolado klarigis al ni la nunan staton de la orientaj Eklezioj. Li klare elmontris, ke ne dogmaj, sed pli vole politikaj motivoj, kaj ankaŭ multaj popolaraj antaŭjuĝoj ĉe katolikoj kaj ne-katolikoj, estas la precipa barilo al la reunuiĝo.

Poste, Pastro Anglikana S-ro LANGFORD JAMES, certigis

al ni, ke multaj el siaj samreligianoj kore deziras la reunuiĝon religian, jam firme kredas katolikajn dogmojn kaj eĉ rekonis la veran situacion de la S-ta Roma Seĝo kiel la necesan centron de kristana Unueco, ne nur pro eklezia tradicio, sed „de jure divino”. Krom en niaj tri kongresoj, neniam oni atingis tiun feliĉan rezultaton. Kvankam kompreneble, katolikaj kongresoj eĉ kiam ĝi ricevas la Apostolan Benon, havas neniun aŭtoritaton, kaj povas nur esprimi piajn dezirojn, tamen ili povos iĝi inter la manoj de Dio rimedoj por pli kaj pli faciligi la celon, t. e. la reunuiĝo de la kristanaro. Ne estas dubo, ke la nescio, la antaŭjuĝo, la ŝovinismo, kaj la malmultaj interrilatoj de la diversaj landanoj de la mondo, estas la precipaj kaŭzoj de la divido inter personoj, kiuj almenaŭ buŝe, kaj ofte tutkore kredas al la sama Dio, kaj al la sama Savinto, la Dihomo Jesu Kristo. La katolikaj Esperantistoj celas nur, per nia kara internacia lingvo, ebligi interrilatojn pli kaj pli intimajn kun niaj karaj fratoj disiĝitaj, kaj alkuraĝigi ilin preĝi pli kaj pli fervore por la dia lumo de la S-ta Spirito. Humilaj kaj obeemaj Katolikoj, kore kaj anime submetataj al la S-ta Roma Seĝo, ili lasas al nia S-ta Patro Lia Papa Moŝto kaj al la Katolika Episkoparo la decidon pri la plej taŭgaj rimedoj por atingi eklezian unuecon kun niaj ĝis nun disiĝintaj fratoj. Ĝis la alveno de tiu feliĉa tago, ni povas almenaŭ ami ilin, preĝi por ili, kaj kuraĝigi iliajn klopodojn por konatigi katolikajn dogmojn al iliaj samreligianoj.

La dua punkto tre kara al mia koro estas la Pacifismo. Estas tre bedaŭrinde, ke pro diversaj kaŭzoj, la katolikoj ne staras inter la unuaj rangoj de la Universala Pacmovado, kiu nuntempe iĝas ĉiutage pli kaj pli potenca, precipe ĉe la popolo, kiu, efektive, havas la plej gravajn motivojn por malami la militon, tial ke estas precize ĝi, kaj ne la plej altrangaj, kiuj ĉefe suferas per la malpaco. La S-ta Seĝo, ekzemple Leo XIII-a kaj Pio X-a jam ofte benis la pacmovadon. Multaj eminentaj Prelatoj ĉiamaniere kuraĝigis la kelkajn kuraĝajn katolikojn, kiuj laboris por akceptigi la principon de la arbitracio por pridecidi dis-

putojn inter diversaj nacioj. Ekzemple la Eminentia Kardinalo MERCIER aprobis kaj benis la „novstarigitan” Belgan Ligon por la paco, pri kio la „Belga Katoliko” parolis antaŭ ne longe. La kialo de la hezito ĉe multaj katolikoj estas la tro-uzo de la vorto „Pacifismo” en kelkaj landoj, en kiuj ĝi estas uzurpata de la malamikoj de la patriotismo kaj de la armeo. Kontraŭe, la veraj pacifistoj estas ĉiuj bonaj patriotoj, kaj ili ne kontraŭstaras la armeon, kies nunan neceson ili ja rekonas, sed nur la militon, kiun ili klopodas grade anstataŭi per la arbitraco.

La belega parolado pri la Katolika Pacifismo, farita de Mg-ro Giesswein dum nia Tria en Budapest, malaperigos, ni esperas, multajn antaŭjugojn kaj konvinkos ĉiujn verajn katolikojn, ke ili devas esti ĉiam la pioniroj en ĉiu homar-ama movado.

Fine mi havas la plezuron sciigi al niaj karaj legantoj, ke la Tria Kongreso unanime decidis alvoki la katolikajn Esperantistojn de la tuta mondo al Pilgrimado al Romo je la komenco de Septembro 1913; dum tiu pelgrimado nia I. K. U. E. faros nian Kvaran Kongreson sub la okuloj de nia komuna Patro Lia Papa Moŝto, sed nian alvokon al la Esperantista Pelgrimaĵo ni faras *sendistinge* al ĉiu Katoliko, kiu aprobas nian ideon: servigi la internacian lingvon por la defendo kaj la disvastigo de nia sankta religio. Ni esperas, ke nia Pelgrimado estos multnombra. Ĉiu bonkatoliko revas viziti la S-tan Urbon almenaŭ unufoje. Jen bona okazo pelgrimi tre malkare, en la agrabla societo de samideanoj, kaj, dank’ al nia kara lingvo ne esti, tiel kiel la plimulto da pelgrimuloj, nur fremduloj, sed amikoj en ĉiu lando, tra kiu ni devos vojaĝi. Kiel katolikoj ni estos amikoj, kaj kiel katolikesperantistoj ni estos *gefratoj* ne nur dank’ al nia komuna kredo, sed ankaŭ dank’ al nia komuna lingvo. Do, karaj amikoj, unuigu niajn voĉojn al la voĉoj de la kongresanoj en Budapest, kiuj, en la lasta kunveno, laŭte kaj ĝoje ekkriis: „Ĝis la revido ĉe la piedoj de nia S-ta Patro, ĝis la revido en Romo!”

Austin RICHARDSON.

Prezidanto de I. K. U. E.



**Kvankam ni avertigis pri tio antaŭ kaj post la Buda-  
pesta Kongreso, ni je nia granda bedauro ne ĝusta-  
tempe ricevis la oficialajn raportojn; tial ni ne povas  
aperigi ilin en tiu ĉi numero.**

**La Redakcio.**

---

## **Akcia societo „Espero Katolika”**

---

**Altestimata Sinjoro Redaktoro,**

Mi estas fiera, ke vi bonvolis konfidi al mi la oficon de raportisto por via gazeto pri la unua ĝenerala kunsido de akciuloj de nia juna akcia societo anonima. Kaj mi estas ĝoja kaj dankema samtempe, ke tiu kunveno tiel bone sukcesis.

Kompreneble mi nur povas raporti pri tiu kunveno en ĝeneralaj terminoj, ĉar la familiaj interesoj de l' akciularo povas eble interesigi neakciulojn, sed ĉi tiuj tute ne rajtos plendi, se tiuj familiaj aferoj estas ne publikigataj.

Konforme al la sciigo en la aŭgusta numero de *Espero Katolika* la Prezidanto de I. K. U. E. lia Pastra Moŝto A. RICHARDSON decidis, ke la unua ĝenerala kunveno akciulara de nia anonima Societo okazos ĵaŭdon la 22-an de Aŭgusto je la 2-a posttagmeze en la kolegio de l' Sankta Emeriko en Budapest.

Sekve la sekretario ĝenerala de I. K. U. E. publikigis tiun decidon al la akciuloj, sed ĉar la loka kongreskomitato ree ŝanĝis la tagordon de la 22-an de Aŭgusto, ankaŭ la loko kaj horo de nia akciulara konsido devis esti sangata. Feliĉe neniu akciulo kontraŭstaris tiun ŝanĝon kaj tial la kunsido povis okazi en unu el la ĉambregoj de l' Hungara Parlemeento la saman tagon je la 3-a posttagmeze.

Kiel Prezidanto oficumadis konforme al artikolo 22-a de la statutoj lia Moŝto RICHARDSON, Prezidanto de I.K.U.E., kiu, malferminte la kunsidon per la Kristana saluto: „Estu laŭdata Jezu Kristo”, eldiras la bonvenon al la akciuloj en



ĉi tiu unua kunsido kaj esprimas sian esperon ke tiu kunveno servu al la interesoj de nia anonima Societo kaj de ĝiaj akciuloj. — Li ankaŭ salutas lian Moŝton Mons. GIESSWEIN, kiu, kvankam ankoraŭ ne akciulo, tamen jam konsentis ke la estraro enregistru lin en la letero de akciuloj. Ĉiuj kunvenintoj aprobas la ĉeeston de Mons. GIESSWEIN kaj la Prezident-komisaro dankas lian Mons. Moŝton por lia partopreno en nia akcia Societo.

Por ke oni procedu laŭ la statutoj, la Prezident-komisaro antaŭ ĉio demandas la kontrolon de la akcioj reprezentataj kaj de la voĉoj, kiujn ili rajtas. El tiu kontrolo ekmontriĝas ke partoprenas la konsidon 37 akcioj rajtigantaj al 33 voĉoj.

Ĉar kelkaj akciuloj deklaris, ke ili ankoraŭ ne sufiĉe konas la statutojn, la Prezidento legigas la artikolojn, kiuj koncernas la ĝeneralan kunvenon.

Pro foresto de la Sekretario-komisaro, la Prezident-komisaro lin antaŭas konforme la art. 22 de l' statutoj.

Laŭ demando de la kunsida Prezidento, la sekretario oficumanta legas la Raporton de la Direktoroj, per kiu ili sciigas la akciulojn pri la historio kaj okazintaĵoj de la Societo, pri la laboroj kiujn necesigis la starigo, la reĝa aprobo, la traduko de la notaria aktaĵo, la nombro de l' akciuloj, de pagantaj abonantoj, k. t. p.

Tiu raporto kun granda intereso estas pridiskutata de la akciuloj kaj detale klarigata al ili per la Prezident-komisaro, tial fine ĝi estis unuanime aprobata.

Ĉar la nuraj sciigoj, senditaj al la estraro, estis la rajtigiloj de 3 akciuloj malhelpitaj ĉeesti la kunvenon kaj ĉar tiuj rajtigiloj jam estis kontrolitaj je la komenco de l' kunsido, la dua punkto de l' tagordo ne naskis diskuton.

Ĉe la 3-a punkto la akciuloj profitis multnombre la okazon por demandi ankoraŭ pli detale pri la stato kaj mastro de la Societo kaj por esprimi diversajn dizirojn. Inter aliaj oni demandis ke la Direktoroj presigu senkoste en ĉiu numero de l' organo „Espero Katolika” la adresojn de l' estraroj de I. K. U. E., de la kongres-komitatoj kaj de ĉiuj oficialaj komitatoj elektita dum niaj kongresoj,

ke same la Direktoroj je la unua paĝo de l' gazeto ne nur resumu la enhavon, sed aldonu al ĉi tiu resumo la paĝnumerojn kie troviĝas la artikoloj. — Unu akciulo proponas ke la enhavo ne estu ĉiam tiel scienca, sed ke ankaŭ oni donu pli simplajn temojn, rakontetojn, spritaĵojn, romanojetojn k. t. p. Alia akciulo cetere ege laŭdante la ĝisnunajn artikolojn afable rekomendas plej eble diversteman enhavon. Diversaj akciuloj laŭdas la ĝisnunan Redakcion kaj nur konsentos ŝanĝon, se ĝi ne malutilos al la enhavo, ili ja volas riĉigi la enhavon, sed nur konservante la bonstilan taŭgan enhavon ĝisnunan. Oni ankaŭ preparolis la eldonon de broŝuroj kaj libroj pri temoj, kiuj interesas la Esperantistan katolikaron, ekzemple la eldono de fidinda resumo pri la historio de nia Eklezio, en kiu resumo kolektiĝas la fontoj fidindaj kaj averto pri nefidindaj skribistoj. Estos kompreneble gravega laboro, sed se la pastroj esperantistaj volus kunhelpi, ni eble sukcesus. Tamen nia Societo estas tro juna kaj tro malriĉa por okupi sin jam nun pri multespezaj aŭ eble riskaj eldonoj. La estraro prudente decidu pri siaj aferoj. Pri la interŝanĝaj numeroj oni konsilas stampeli, por ke oni ne povu ilin vendi kaj nur sendi interŝanĝajn ekzemplerojn al *valoraj* gazetoj.

La Prezident-komisaro unualoke atentigas, ke laŭ la statutoj la nuna kunveno ne rajtas *decidi* pri la faritaj demandoj kaj esprimitaj deziroj, ĉar ili ne estis laŭregule metitaj en la hodiaŭan tagordon. Tio ĉi tamen ne malhelpas, ke ni *diskutu* tiujn demandojn, sed tiel farante li rimarkas, ke ni ne devas tro miksi nin en la mastrumado de nia Societo, kiun ni ja komisiis al la estraro. Se la akciuloj volas ĉion reguligi mem, ili ne bezonas Direktorojn nek Komisararon. Cetere la Prezident-Komisaro deklaras sin mem ne sufiĉe kompetenta por decidi ĉu la plenumo de l' demandoj ĵus faritaj kaj de la deziroj ĵus esprimitaj utilos aŭ ne utilos al niaj societaj intereso, sed li estas certa, ke la Direktoroj, kiuj nenion pli deziras ol utiligi kaj florigi la societon, sendube realigos la deziresprimojn de la akciuloj, se ili prosperigos la Societon, ĉar ambaŭ Direktoroj korege amas la Societon, kiun ili estras,

kaj nur tial la Prezidant-Komisaro akceptis, kvankam kontraŭvole, la prezidantecon, ĉar li konis la laboremon de la Direktoroj kaj ilian grandan sindonemon al la interesoj de nia Societo.

Fine la Prezidant-Komisaro korege dankas je la nomo de l' Direktoroj kaj de la forestantaj komisaroj por la afablaj diskutoj dum ĉi tiu kunveno kaj precipe por la esprimata kontenteco de la akciuloj pri la ĝisnuna laboro de l' estraro. — Se la akciuloj kaj la estraro ĉiam tiel interkonsentos, la parolanto plenkonfidas, ke ni kune sukcesos prosperigi nian aferon. — Por pruvi sian kontentecon, la akciularo antaŭ ol disiri forsendis poŝtkartojn al ambaŭ Direktoroj, enhavantajn la manskribojn de ĉiuj partoprenintoj al la kunveno.

Tilburg (Nederlando).

FRANS KNAAPEN.

---

## Pri J. M. SCHLEYER.

### Aŭtoro de *Volapük*.

Estas ia nomo, kiu ĉiam inspiras al Esperantistoj sentojn de profunda respekto: Ĝi estas la nomo de Johannes Martinus SCHLEYER, aŭtoro de *Volapük*.

En sia malferma parolado, ĉe la 7-a Kongreso, D-ro ZAMENHOF, laŭ sia bela kutimo, laŭdis la verkon de tiu „vojmontrinto”, kiu, la unua, *vere* kaj *praktike* laboris por la afero de la internacia lingvo, entuziasmigis por ĝi milojn da homoj, kaj popularigis en la mondo la ideon de interhoma kompreno.

La tuta Antverpena kongresanaro varmege aplaŭdis nian majstron, montrante tiel, ke ĝi plene aliĝas al liaj sentoj kaj, kun li, esprimas al Prelato SCHLEYER sian sinceran respektesprimon.

---

1) Tiu-ĉi artikolo estis skribita en Julio, do ne aludas la morton de Mons. SCHLEIER, kiu okazis en Aŭgusto 1912. *Espero Katolika* nun donas tiun-ĉi belan artikolon kiel memoraĵo al tiu fama kaj pia samreligiano, petante preĝon por la ripozo de lia animo.

Mi ne scias, kiun tiu nobla gesto pli multe honoras: la aŭtoron de *Volapük* aŭ la aŭtoron de Esperanto.

Cetere, pli ol unu punkto de karaktersimileco proksimigas tiujn du virojn, kiuj donis sian tutan vivon al la nobla afero de la lingvo internacia: SCHLEYER, ministro de religio, kiu landlimojn ne konas, kaj ZAMENHOF, ido de senpatruja popolo, kiu ludis en la homaro la plej gravan rolon iam ajn luditan de ia ajn popolo: ambaŭ ŝajne antaŭdestinitaj al tiu rolo, — ambaŭ idealistoj, revemuloj, modestuloj...

Antaŭ kelkaj monatoj eksciante, ke estas erara la sciigo anoncita en multaj ĵurnaloj pri morto de SCHLEYER, mi tuj skribis al la „Patriarko de Konstanz”... Mi petis, ke li bonvolu sendigi al mi gramatikon de *Volapük*. Sed, ho ve! mi promesis al li, ke mi ĝin lernos, kaj mi komprenas nun, ke mi faris teruran promeson... Mi certigas al ĉiuj, ke tiu lingvo, admirinde kaj genie konstruita, estas malfacilega por memori.

Kvin aŭ ses tagojn post mia peto mi ricevis pakaĵon de paperoj, senditaj de SCHLEYER *mem.* Tiu pakaĵo konsistas, krom la gramatiko, el diversaj propagandiloj, el artikoloj de SCHLEYER. Eĉ, konforme al mia postulema peto, la bona maljunulo bonvolis aldoni sian portreton, kun tiu subskribo mane skribita: „SCHLEYER J. M. dat. vp.” (Tiuj du lastaj signoj estas mallongigoj de „*Datuvel Volapüka*”, t. e. „*elfarinto de la Mondolingvo*”).

Plej interesaj estas tiuj paperaĵoj. Ili pravas al ni, ke la simpatia 80-jarulo ne forlasis sian revon, sian iluzion, kaj restos ĝis la morto fidela „Volapükan”, esperos ĝis la lasta elspiro en la triumfo de sia sistemo. Unu el la ricevitaj folioj estas datumita „17-an de Julio 1911”. Ĝi estas varmega pledo por Volapük, kies simplecon, „facilecon”, belecon ĝi elokvente montras... Post resumo de la gramatiko oni legas:

„Tio, kio povus ankoraŭ konkurenci nian lingvon, estas la *Esperanto* de iu rus-hebrea Doktoro nomita ZAMENHOF, kiu per varmega reklamo propagandas sian verkon. La

malriĉa aŭtoro de Volapük ne havas, ho ve! la financajn rimedojn de tiu konkuranta lingvo por ĝin tiel varme propagandi. Sed ni havas la konsolon vidi, ke la veraj scienculoj restas nepre fidelaj al nia pensoplena mondlingvo. Cetere ekzistas en la mondo pli ol 1800 diplomitaj geinstruantoj de Volapük, kiuj ricevis sian diplomon de nia Majstro mem, el Konstanz...

Mi konfesas, ke la persisteco de tiu iluzioplena kaj naiva, sed tamen ĉarma konfido kaj kredo, pli kortuŝas min ol la gesto de la patro de la *Blua Lingvo* donanta monon por la propagando de *Ido!* La fideleco estas bela virto, kaj tiuj, kiuj komprenas ĝian valoron, respekte salutos kun mi SCHLEYER kaj lian lastajn fidelajn disciplojn.

Mi diris, ke pli ol unu punkto proksimigas la aŭtoron de Volapük kun la aŭtoro de Esperanto.

La sama sento de homamo kaj frateco, la sama utopiema espero al estonta universala paciĝo de la popoloj ilin direktas. ZAMENHOF verkis la *Espero*; SCHLEYER skribis ĉie sian devizon: „*Menadè bal püki bal!*” (*Al unu homaro, unu lingvo*), kaj ankaŭ provis enigi profunde en la koron de ĉiu Volapükisto tiun senton de homa frateco.

La maljuneco ne ŝanĝis nek eĉ paligis la vivecon de lia sento. Ĉiutage, post ekspedo de sia korespondo al siaj fideluloj, li faras sian kutiman promenon. Antaŭ la trankvileco de la naturo, la beleco de la bluaj ondoj de Konstanz'a Lago, la kantoj de la birdoj, li revas..., Li revas pri la harmonio, kiu regas sur la tero, se la homoj imitus la naturon kaj la birdojn, — se ili plenumus la Diajn ordonojn, — se ili amus unuj la aliajn, — se ili parolus ĉie la saman lingvon...

Li revenas, malrapide; li prenas sian plumingon, kaj skribas koncize en dudek linioj tion, kion li ĵus revis por la feliĉo de la homoj... Li ĝin sendas al presisto. La morgaŭan tagon, dum sia promeno, al ĉiuj, kiujn li renkontas en la vojo, — al la kamparanoj, precipe, kun kiuj li ŝatas longe paroli, kaj kiuj ŝatas ricevi liajn konsilojn, — li disdonas siajn paperetojn... Mi havas kelkajn el tiuj paperetoj: Unuj rilatas al la edukado de la infanoj; aliaj al

kuracado de multaj ĉiutagaj malsanetoj de la kapo, stomako aŭ ventro, . . . aliaj pri la maniero kulturi la florojn aŭ florigi la dezertojn. Kaj preskaŭ ĉiuj liaj konsiloj finiĝas tiel: Se la homoj farus tion, ili estus feliĉaj; ili ne suferus tiom da malsanoj, — ili evitus la militon, kiu estas terura kruelaĵo, k. t. p.

Jen mallonga nekompleta skizo pri la aŭtoro de la sola lingvoprojekto, kiu, krom Esperanto, vere antaŭenpuŝis en praktikan vojon la mondolingvan demandon.

Volapük baldaŭ tute malaperos kun siaj malmultaj fidele restantaj adeptoj. Sed la nomo de SCHLEYER vivados en la memoro de la posteuloj, kaj la homaro ĝin dankeme kunigos kun tiu de ZAMENHOF, la plifeliĉa trovinto de la vera kaj definitiva solvo de la grava internacilingva problemo.

---

NOTO. - Johann Martinus SCHLEYER naskiĝis en Oberlanda Duklando Baden, Germanujo, la 19-an de Julio 1831. Li publikigis sian lingvon la 31-an de Marto 1879. Paroĥestro apud Konstanz, li ricevis de la Papo Leono XIII la honorigan titolon de Prelato.

---

Jen, por montri la belan animon de la „Patriarko de Konstanz”, traduko de du el la folietoj, kiujn li disdonas:

### **Dek gravaj ordonoj pri la edukado.**

La artoj de ĉiuj artoj nomiĝas, formado kaj konduko de la junaj animoj kaj korpoj. Ho! Trifoje feliĉega, la infano por kiu la domo, preĝejo kaj lernejo formas tutaĵon.

1. Bone eduku vian unuan infanon: la sekvontaj estos kiel simietoj, kiuj imitos lin.

2. Nenian malbonon permesu al via infano, sed lasu lin fari la tutan bonon kiun li deziras, aŭ devos fari.

3. Rekompensu lin pro la bono, kaj tuj lin punu pro la malbono, kiun li faris aŭ intencis fari.

4. Forĵetu precipe el li mensogemon, kalumniemon, ŝtelemon kaj malbonecon kontraŭ aliaj.

5. Gardu lin for de la stratoj, fi-knaboj, fi-servistoj, malbonaj okazoj, kaj donu al li nur ion bonan, utilan kaj belan por legi.

6. Ne toleru en li iun ajn destruecan instinkton.

7. Severe lin tenadu ĉe la laboro kaj preĝo, parolu ofte al li pri Dio kaj parolu ofte al Dio pri li.

8. Ne permesu, ke li batu aŭ suferigu iun el siaj fratoj aŭ fratinoj, aŭ alian infanon.

9. Ekzercigu vian infanon en ĉiuj virtoj, precipe en la sankta amo de Dio, en la obeemo, ordemo, pureco kaj sindonemo. Kaj transdonu ĉiujn almozojn per liaj manoj.

10. Montru al li ĉiutage la konsekvencojn de la bono kaj de la malbono.

Konstanz, 9-an de Aŭgusto 1911.

### Reveno al la patriarka vivo.

Ĉu ci volas, ho homaro, refari cian feliĉon, revenu al la patriarka vivo.

Se la homaro volas eliri el sia nuna ekscitiĝo kaj universala nervemeco, ĝi devas observi almenaŭ la dek jenajn ordonojn:

1. Refariĝu simpla en cia vivmaniero kaj konduto.
  2. Vivu laŭnature, t. e. leviĝu kaj kuŝiĝi samtempe kun la suno.
  3. Evitu ĉion, kio estas danĝera.
  4. Ĝuu nur tion, kio ne estas falsa.
  5. Agu en ĉio laŭmezure.
  6. Forlasu kaj detruu la militemecon.
  7. Refariĝu gastema.
  8. Havu ĉiam kun ciaj najbaroj nerompeblan pacon, kun ili amike kaj helpeme vivu.
  9. Amu kaj praktiku ĉiujn virtojn.
  10. Estu sincere kaj profunde religia kaj korsimpla.
- Ĉio, kio estas krom tiuj dek punktoj nur malmulte povas helpi al la homaro.

Oni do devas krei veran Patriarkan Ligon, kiu ne zorgos pri nacieco, vivstato aŭ lingvo de la membroj.

Cl. COLAS.

Paris, 14-an de Julio 1912.

---

# La Patrino de Judas'o.

---

## I.

Murmurkvietaj printemptago pendis super Jerusalemo, la urbo de profetoj kaj la blankaj domoj dormetis en la oraj radioj de la ekkuŝiganta suno. Tiel pura estis ĉielo kiel



rigardo de virgulino kaj l'aero estis travarmetita de kreskaĵaj kaj blankdornujaj odoroj.

En la ĝardeno de Olivujoj senmove staris la jarcentaĝaj sikomoroj kaj la vinbermontoj ĉirkaŭigis la urbon per bluiĝanta zonumo.

Pura estis la ĉielo kaj dolĉa la aero; nun estis plenumita sur Golgotho la laboro de la Savigo kaj je la kruco pendis la Vidanto, mortinta pro siaj altaj idealoj; post la vergbatado kaj la mokado kun kansceptro, kun dorna krono kaj purpura mantelo; post kiam li, ĉirkaŭita de moveganta kaj krieganta popolaĉo, ŝultroportis la krucon ĝis la alta roko.

Kaj kiam de Kristaj lipoj, antaŭ du horoj, plendsonis la „Eli, Eli, Lamma Sabaktani”, tiam disŝiriĝis la kurteno de la templo kaj tremegis la ŝtonegoj; tiam la tomboj malfermiĝis, la mortintoj promenadis, nuboj sin levis kaj restis pendantaj super la tremanta urbo.

Kaj fariĝis nokto . . . .

Sed el la nokto ree ŝvebis la lumo kaj kun la lumo kvieto kaj sunoro fluadis kaj la printempo plidolĉe odoris.

Kaj de Golgotho tiam malsupreniris la gracitaliaj Israelaj filinoj, kies okuloj briladis sub la silknigra vualo de la belaj okulharoj, kies briletantaj haroj ondkrispe falis sur la ŝultroj; de Golgotho malsupreniris la malhonestaj fuŝkomercistoj kun siaj pikantaj lacertokuloj kaj la hipokritaj farizeoj, kaj la larĝeĉirkaŭvestitaj teologiistoj kun frizitaj barboj kaj aglonazoj; kaj ankaŭ la soldatoj kiuj kubludis por la robo de Kristo kaj kiuj nun ridetante ĉirkaŭiris la fierparolantan servistinon de la palaco de Kaifo; kaj ankaŭ patrinoj, kun, malantaŭ ili, malbonvestitaj infanoj, virinoj kiuj timege priparolis ĉiujn mirindaĵojn kaj diris: „Ĉu tiu viro estis efektive la filo de Dio?”

Kaj kelkaj turnis la vizaĝon al la Sufereginto kaj vidis la krucon glorflamiĝantan sur la orbriltremanta okcidento; ili vidis la profunde suferantan Patrinnon ripozantan kun la pala vizaĝo kontraŭ ŝultro de la blonda Johano; ili vidis la surgenuan Maria'on de Magdalo, kiu karesis la piedojn de Jesuo per siaj belaj haroj.

Kaj en olivarbo kantis birdo kanton de amo . . . . .

## II.

Kiam Jesuo estis alnajlita al la kruco, virino vagadis sur la vojoj ĉirkaŭ Golgotho. Ŝi vagadis, kurbita, kiel estaĵo klinita de la ŝarĝego de jaroj. Kaj kelkfoje ŝi haltis por plendi, sed ree daŭrigis sian senkvietan iradon.

Ĉar eksciinte ke Jesuo estis perfidita, ŝi, virino el la lando de Judea, alrapidis por sciigi ĉu estas vere kion oni ĉie rakontis kaj ĉu Judas'o sian dian Majstron liveris al liaj turmentistoj.

Kaj kiam oni tion al ŝi certigis, ŝi forkuris, kun kapo klinita kaj fikse rigardante pli kaj pli traterurigita pro senespero; ŝi forkuris pala kaj kovrita per la polvo de la vojoj. Kaj neniun ŝi kuraĝis alproksimiĝi, hontema, kaj foje ŝiaj membroj skuiĝis de tremetadoj kaj tiam fluis larmoj sur ŝiaj vangoj.

Kaj ŝi forkuris sentante nun kiel en ŝia propra kapo pikadis la dornoj, ŝi sentis kiel ungoj eniriĝis en ŝiajn manojn kaj piedojn. Kaj ŝi aŭdis kriegadon ĉirkaŭ si kaj mokadon. Kaj ŝi plendploris kaj ŝiaj dentoj batis. Kaj tiel malplena fariĝis ŝia kapo ke ŝi svenis. Nun ekbategis en ŝia koro kaj poste timego al ŝi premligis la gorgon, kaj ŝi premis per la manoj sian bruston, ĉe kiu iam ŝia ido ripozis, ŝia filo kiun ŝi tiam karesis kaj admiris kun koro superverŝita de feliĉo, kun spirito lacaŭskultinta en songo de espero kaj amo.

Kaj nun ŝi vagadis kiel malbenitulino, nenion plu aŭdante, en mondo de konfuzo. Ŝiaj okuloj brulis kaj piko trapikis ŝian kapon. Sekaj estis ŝiaj lipoj kaj ankaŭ la gorgo kaj foje ŝi etendis preĝante la brakojn, kaj ŝi ne sciis kial.

Ŝi vagis, vagadis, kaj fine alvenis en aleo de maljunaj sikomoroj, sub kies foliaro aŭdiĝis misterplenaj bruetadoj. Kaj fikse ŝi rigardis per la grandaj okuloj en la malgrasa osta vizaĝo. . . . .

Ŝi vagadis. . . . .

Nun, kriego de teruro. Senmove ŝi restis, kun la brakoj etenditaj, kvazaŭ por defendi sin kontraŭ vidaĵo, kun lipoj

malformitaj, kiel estaĵo el kiu ĉia vivo ŝajnis forfluginta. . . .

Ĉar je kurbiĝanta arbobranĉo, ŝi vidis sian Judas'on, kaj tiu, pro malespero, mortpendigis sin. . . . .

### III.

Varmete la vespero falis sur Golgotho kaj Jerusalemo; pli dolĉe odoris la floroj kaj la arboj preĝetis en la kreskiganta nokto.

En la oriento sin levis la luno kiel ora ŝildo kaj ĝia lumo fluadis super la plataj tegmentoj de la urbo kaj super la foliaro de la malheliĝantaj arboj; ĝia lumo malvarme englitis en la akvon de la dormantaj fontoj, malvarme en la tombtruojn de la rokoj, kie dormadas la ostaro de la gefiloj de Israelo.

Kaj Jerusalemo revadis dum tiu mirinda nokto.

En la malproksimo resonis de temp' al tempo la paŝoj de la gardistoj de tombo de Jesuo kaj el la vinbermontoj aŭdiĝis la krio de la gardistoj. Kaj hundoj foje bojis.

Tiam de la Kalvario malsupreniris virino, kun mieno pale radianta pro dolorego, kun korpo ĉirkaŭmalheligita de larĝfaldita vestaĵaro. Malrapide ŝi malsupreniris kun okuloj fermitaj kaj per la manoj ŝi apogis sin sur la ŝultro de sia gvidanto. Kaj ambaŭ silentis.

Foje ŝi haltis kaj sopiro treme eliris ŝian premitan bruston, ĉar pli akre trafendis doloregoj ŝian koron kaj la kapo pezis tiel peze pro sufero.

Malrapide ŝi malsupreniris, malsupreniris.— . . . .

Kaj kiam ŝi kaj ŝia gvidanto alvenis apud la pordegoj de la dormetanta urbo, pordegoj, kontraŭ kiuj ripozis, en la lunlumo, kelkaj dometoj, la gvidanto haltis kaj diris, teren rigardante:

„Patrino, kun vizaĝo en la polvo, kuŝas tie profunde malĝojigita virino.”

Kaj la okuloj de la alparolita malfermiĝis kiel floroj de doloro kaj nokto, kaj antaŭen klinis ŝi tiam kaj murmuretis:

— „Fratino, kial ploras vi?”

Tiam la en polvo etendita malrapide levis la detruitan vizaĝon kaj senespere la larĝmalfermitajn okulojn.

— „Fratino, kial malĝojas vi?”

Kaj tremanta mano glitis sur brulanta frunto kvazaŭ por vekigi el ĝi vortojn de konfuzo kaj tiam:

— „Mia filo estas mortinta kaj estas ankoraŭ enteriĝonta.”

— „Patrino, vian suferon sentas mi, kiu enterigis mian Jesuon.”

— „Ve!” . . . .

Kaj profunde el la animo elŝiriĝis tiu plendo kaj en timigo la mizeregulino falis teren kaj plorĝemante:

— „Ne malbenu min; ne malbenu la patrinon de Judas'o! Mia filo, pro malespero mortpendigis sin!”

Aŭdante tiujn vortojn, senmove staris Patrino de Jesuo, kiu estis Tutbona Konsolanto kaj Dolĉulo. Kaj la okulojn ŝi fermis kaj pensis pri sia Filo.

Tiam en siaj benataj manoj ŝi prenis la kapon de la doloranta, ŝi kisis ĝin kaj diris:

— „Sekvu min. Nur pri pardono kaj homaramo predikis mia Jesuo.

Originale flandre verkis

PIET VAN ASSCHE.

(Uren van Rust.—

Maldeghem 1912.)

Esperantigis

OSCAR VAN SCHOOR.

## Esperanto-Movado.

### Parolo de D-ro L. L. Zamenhof \*)

*ĉe la malfermo de la Oka Internacia Kongreso Esperantista.*

La unuaj vortoj, kiujn mi volus hodiaŭ eldiri al vi, karaj samideanoj, estas vortoj de kora gratulo, ĉar ni havas hodiaŭ grandan feston. Ĵus finiĝis dudek kvin jaroj de la tempo, kiam—post longa naska preparado—aperis publike la lingvo, kiu nin ĉiujn unuigas, por kui ni ĉiuj laboras kaj kiu enkorpigas en si tiun homofratigan ideon, kiun la plimulto el ni havas en sia koro kaj kiu dum dudek kvin jaroj flame instigadis nin labori, malgraŭ ĉia malfacileco kaj ĉiuj malhelpoj.

\*) Laŭ la speciala Jubilea numero de *Pola Esperantisto*.

Dudek kvin jaroj de laborado por Esperanto kaj por ĝia ideo! Tion povas plene kompreni nur tiuj personoj, kiuj partoprenis en tiu laborado de la komenco ĝis nun. Bedaŭrinde tre nemultaj estas tiuj personoj. El la laborantoj de la unua tempo tre multaj jam delonge plu ne vivas, aliajn lacigis la malfacila, grandan paciencon kaj persistecon postulanta vojo, kaj ili malaperis el nia anaro. El tiuj personoj, kiuj troviĝas nun en ĉi tiu ĉambrego, la grandega plimulto en la unuaj jaroj de Esperanto nenion sciis pri ĝi aŭ neklare aŭdis pri ĝi nur kiel pri ia freneza, mokinda kuriozaĵo; tre multaj el vi en la momento de la apero da Esperanto estis ankoraŭ infanoj; multaj, kaj certe ne la malplej fervoraj el vi, en tiu tempo eĉ tute ne ekzistis ankoraŭ en la mondo. La grandega plimulto el vi aliĝis al nia afero nur tiam, kiam ĝi estis jam sufiĉe forta kaj elprovita. Tre kaj tre malgranda, facile kalkulebla per la fingroj, estas la nombro de tiuj personoj, kiuj iris kun Esperanto de la momento de ĝia naskiĝo ĝis la nuna tempo. Kortuŝite ili povas nun rememori, kiel terure malfacila estis ĉiu paŝo en la komenco, kiam ĉiu aludo pri Esperanto postulis specialan kuraĝon, kiam el ĉiu milo da semoj, kiujn ni en plej primitiva maniero, sen helpo kaj sen rimedoj pacience ĵetadis en la teron, apenaŭ unu ricevis radikojn.

Dudek kvin jaroj! grandegan gravecon havas tia peccata tempo en la historio de lingvo artefarita. Lingvoj naturaj kreskas tute trankvile, ĉar kun tia lingvo neniu kuraĝas fari iajn eksperimentojn aŭ fleksi ĝin laŭ sia gusto; sed pri lingvo artefarita ĉiu opinias, ke li havas rajton de voĉo, ke li povas aŭ eĉ devas direkti la sorton de la lingvo laŭ sia kompreno. En lingvo natura ĉiu eĉ plej granda efektiva malbonaĵo neniun incitas, eĉ neniun medigitas, kaj estas akceptata kun plena kontenteco aŭ rezignacio; en lingvo artefarita ĉio ŝajnas al ni kritikinda, ĉiu bagatelo, kiu ne estas konforma al nia gusto, pikas al ni la okulojn kaj vekas deziron de refarado. Lingvo artefarita dum longa tempo estas elmetata al senĉesaj ventoj, al senĉesa tirado kaj puŝado. Kiom da ventoj, kiom da senĉesa tirado nia

lingvo devis suferi dum sia dudekkvinjara vivo ! Se ĝi tamen ĉion sane eltenis, se malĝraŭ ĉiuj ventoj kaj puŝoj ĝi dum dudek kvin jaroj vivis kaj kreskis regule kaj rekte, ĉiam pli fortiĝante kaj riĉiĝante, neniam fleksiĝante aŭ kripliĝante, neniam minacante disfali en dialektojn, sed ĉiam pli kaj pli fortikigante sian tute difinitan, ĉie egalan spiriton, neniam perdante hodiaŭ, kion ĝi akiris hieraŭ, — ni povas pri tio sincere nin gratuli.

Antaŭ dudek kvin jaroj mi timeme demandis min, ĉu post dudek kvin jaroj iu en la mondo scios ankoraŭ, ke ekzistis iam Esperanto, kaj — se Esperanto vivos — ĉu oni tiam povos ankoraŭ kompreni ion, kio estis skribita en Esperanto en ĝia unua jaro, kaj ĉu angla esperantisto povos kompreni esperantiston hispanan. Nun pri ĉi tio la historio donis jam plenan kaj perfekte trankviligan respondon. Ĉiu el vi scias, ke verko, skribita en bona Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj, en plena mezuro konservas sian bonecon ankaŭ nun, kaj la legantoj eĉ ne povas diri, ke ĝi estas skribita en la unua jaro de ekzistado de nia lingvo ; ĉiu el vi scias, ke inter la stilo de bona angla esperantisto kaj la stilo de bona hispana esperantisto en la nuna tempo ekzistas absolute neniam diferenco. Nia lingvo konstante progresas kaj riĉiĝas, kaj tamen, dank' al la *reguleco* de sia progresado, ĝi neniam ŝanĝiĝas, neniam perdas la kontinuecon kun la lingvo de tempo pli frua. Kiel la lingvo de homo matura estas multe pli riĉa kaj pli elasta, ol la lingvo de infano kaj tamen la lingvo de ĝuste parolanta infano neniam diferencas de la lingvo de homo matura, tiel verko, skribita en Esperanto antaŭ dudek kvin jaroj ne estas tiel vortoriĉa, kiel verko, skribita en la nuna tempo, kaj tamen la lingvo de tiu tempo perdis absolute nenion el sia valoro ankaŭ en la nuna tempo. Lingvo, kiu eltenis la provon dum dudek kvin jaroj, kiu en plej bona kaj ĉiam pli floranta stato travivis jam tutan homan generacion kaj estas jam pli maljuna, ol multaj el ĝiaj uzantoj, kiu kreis jam grandan, potence kreskantan literaturon, kiu havas sian historion kaj siajn tradiciojn, sian tute precizan spiriton kaj siajn tute klarajn idealojn, — tia lingvo ne be-

zonas jam timi, ke io pereige depuŝos ĝin de tiu natura kaj rekta vojo, laŭ kiu ĝi evoluas.

La vivo kaj la tempo garantiis al nia lingvo naturan forton, kiun neniu el ni povas senpune malrespekti. La hodiaŭa jubileo estas festo de tiu vivo kaj tempo.

\*  
\* \*  
\*

Por ke ni, vivantoj, povu festi la hodiaŭan jubileon, fervore kaj sindone laboris multaj personoj, kiuj nun jam ne vivas. Nia morala devo estus rememori ilin en la nuna solena momento. Sed ho ve! ilia nombro estas tro granda, por ke ni povu ilin ĉiujn citi, kaj krom tio la pli granda parto el ili laboris tiel modeste, ke ni eĉ ne scias iliajn nomojn. Tial, por ne fari maljustan apartigon inter eminentuloj kaj ne-eminentuloj, mi citos neniun nomon. Mi devas fari escepton nur por nia kamarado Van-der-Biest, kies nomo estas ankoraŭ tro freŝa en memoro ĉe ni ĉiuj, kiu en la pasinta jaro aranĝis kaj prezidis nian grandan ĉiujaran feston kaj kies morto estas sendube ligita kun tiuj grandaj laboroj kaj malagrablajoj, kiujn li prenis sur sin por ni ĉiuj. En via nomo mi esprimas funebran saluton al la ombroj de ĉiuj niaj karaj kamaradoj, kiujn dum la pasintaj dudek kvin jaroj forŝiris de ni la morto. Iliaj ombroj staru nun antaŭ niaj okuloj, kvazaŭ partoprenante en tiu granda festo, kiun ili preparis, sed ne ĝisvivis. Mi proponas al vi, ke ni honoru ilian memoron per leviĝo de niaj seĝoj.

\*  
\* \*  
\*

Nun, kiam la matureco de nia afero estas jam tute eksterduba, mi turnas min al vi, karaj samideanoj, kun peto, kiun mi jam antaŭ longe volis direkti al vi, sed kiun mi ĝis nun prokrastis, ĉar mi timis fari ĝin tro frue. Mi petas, ke vi liberigu min de tiu rolo, kiun mi, pro kaŭzoj naturaj, okupis en nia afero dum dudek kvin jaroj. Mi petas vin, ke de la nuna momento vi ĉesu vidi en mi „majstron,” ke vi ĉesu honori min per tiu titolo.

Vi scias, ke tuj en la komenco de nia movado mi deklaris, ke mi ne volas esti mastro de Esperanto, sed ke la tutan mastrecon pri Esperanto mi en tuta pleneco transdonis al



la esperantistoj mem. Vi scias ankaŭ, ke de tiu tempo mi ĉiam lojale agadis aŭ almenaŭ penis agadi konforme al tiu deklaro. Mi donadis al vi konsilojn, kiel mi povis, sed neniam vi aŭdis de mi la vortojn: "tion mi postulas" aŭ "tion mi deziras." Neniam mi provis altrudi al vi mian volon. Tamen, konsciante, ke ĝis sia plena fortikiĝo nia afero bezonas ian enkorpigitan standardon, mi—laŭ via deziro—dum dudek kvin jaroj plenumadis tiun rolon, kiel mi povis, kaj mi permesadis, kvankam tre nevolonte, ke vi vidu en mi ĉefon kaj majstron. Kun ĝojo kaj fiereco mi konstatas, ke vi ĉiam montris al mi sinceran konfidon kaj amon, kaj pro tio mi eldiras al vi mian plej koran dankon. Sed nun permesu al mi, ke mi fine formetu de mi mian rolon. La nuna kongreso estas la lasta, en kiu vi vidas min *antaŭ* vi; poste, se mi povos veni al vi, vi ĉiam vidos min nur *inter* vi.

Jen estas la kaŭzo, kiu devigis min fari la nunan decidon:

La ekzistado de ia natura konstanta ĉefo, eĉ se tiu ĉefo havas nur la karakteron de unuiganta standardo, prezentas gravan maloportunaĵon por nia afero, ĉar ĝi donas al la afero kvazaŭ personan karakteron. Se al iu ne plaĉas mia persono, aŭ miaj politike-religiaj principoj, li fariĝas malamiko de Esperanto. Ĉio, kion mi persone diras aŭ faras, oni ligas kun Esperanto. La tro honora titolo de majstro, kiun vi donas al mi, kvankam ĝi en efektiveco koncernas nur la aferon de la lingvo, fortentas de Esperanto multajn personojn, al kiuj mi pro ia kaŭzo ne estas simpatia kaj kiuj timas, ke, fariĝante esperantistoj, ili devus rigardi min kiel sian moralan ĉefon. Ĉiu. kies opinio pri aferoj esperantistaj estas alia ol mia, ofte sin ĝenas, eldiri libere sian opinion, por ne kontraŭbatali publike tiun, kiun la esperantistoj nomas sia majstro. Se ies opinion la esperantistoj ne volas akcepti, li vidas en tio nur la ĉiopovan influon de la majstro. Nun, kiam nia afero estas jam sufiĉe forta, estas necese, ke ĝi fine fariĝu absolute libera, ne sole libera de ĉiuj personaj *dekretoj*, kia ĝi fariĝis jam antaŭ dudek-kvin jaroj, sed ankaŭ de ĉia efektiva aŭ ŝajna persona *influo*. Estas necese, ke la mondo sciigu tute

klare, ke Esperanto povas havi aŭ ne havi siajn libere elektitajn gvidantojn, sed ke ĝi posedas nenian konstantan *majstron*. Nomu min per mia nomo, nomu min fondinton de la lingvo, aŭ kiel vi volas, sed mi petas vin, ne nomu min plu „Majstro”, ĉar per tiu morale tro liganta nomo vi malliberigas nian aferon.

Multaj el vi portas en sia koro la samajn idealojn, kiel mi, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo; sed la mondo devas scii, ke tiu spirita parenceco inter mi kaj vi estas laŭvola, ke la esperantismo ne povas esti responda pri miaj personaj ideoj kaj aspiroj, kiuj por neniu el vi estas devigaj. Se mi ion diras aŭ faras, kio ne estas konforma al la gusto aŭ konvinkoj de tiu aŭ alia el vi, mi deziras, ke tio neniun el vi ĝenu kaj ĉiu el vi havu la rajton diri: tio estas tute privata ideo aŭ frenezaĵo de Zamenhof, kaj ĝi havas nenion komunan kun la Esperanta movado, en kiu li estas nun persono tute privata. La interna ideo de Esperanto estas: sur neŭtrala lingva fundamento forigi la murojn inter la gentoj kaj alkiutimigadi la homojn, ke ĉiu el ili vidu en sia proksimulo nur homon kaj fraton. Ĉio, kio estas super tiu interna ideo de Esperanto, estas nur *privataĵo*, kiu povas eble esti *bazita* sur tiu ideo, sed neniam devas esti rigardata kiel *identita* kun ĝi.

\* \* \*

Antaŭ ol mi formetas de mi ĉian oficialan rolon en nia afero, mi ankoraŭ la lastan fojon admonas vin: laboru ĉiam en plena unueco, en ordo kaj konkordo. Ĉiujn dubajn demandojn, kiu koncernas la tutan Esperantan aferon kaj kiuj ne tuŝas la personan liberecon de ĉiu aparta esperantisto, solvu ĉiam pace, per regula interkonsiliĝo de viaj egalrajte elektitaj delegitoj kaj per disciplina cedo de la malplimulto al la plimulto. Neniam permesu, ke en nia afero regu la principo: „kiu pli laŭte krias, tiu estas prava.” Per unueco ni pli aŭ malpli frue certe venkos, eĉ se la tuta mondo batalus kontraŭ ni; per interna malpaco ni ruinigus nian aferon pli rapide. ol tion povus fari ĉiuj niaj malamikoj kune. Ne forgesu, ke Esperanto estas ne sole simpla lingvo, kiun ĉiu el ni uzas nur por siaj propraj

bezonoj, sed ke ĝi estas grava *socia problemo*, ke, por atingi nian celon, ni devas konstante *propagandi* nian aferon kaj zorgi pri tio, ke la mondo havu *estimon* kaj *konfidon* por ĝi. Se en nia afero aperas io, kio ŝajnas al ni malbona, ni povas trankvile ĝin forigi per komune interkonsentita decido; sed ni neniam semu en nia tendaro reciprokan malamon kaj malpacon, kiu nur ĝojigas kaj triumfigas niajn malamikojn. En la unuaj jaroj de nia laborado sur nia standardo estis skribtaj la vortoj „espero, obstino kaj pacienco”; tio tute sufiĉis, ĉar ke ni, samideanoj, devas reciproke nin estimi kaj helpi, tio por ĉiu estis komprenebla per si mem. En la lastaj jaroj ni bedaŭrinde ofte forgesis tiun devon; tial nun, transirante en la duan gravan periodon de nia historio, en la duan kvaronjarcenton, ni skribu sur nia standardo novan vorton, kaj ĉi tiun vorton ni ĉiam respektu kiel sanktan ordonon; tiu vorto estas: „konkordo.”

\*  
\*  
\*

Mi finis tion, kion mi intencis diri al vi, karaj amikoj. Mi scias tre bone, ke multajn el vi mia nuna parolo malagrade senluziigos. Kun maldolĉa sento de neplenumita espero vi eble demandos: ĉu en sia lasta kongresa parolo, en sia „kanto de cigno,” li nenion pli havis por diri al ni? ĉu en la grava tago de la jubileo de la esperantismo, de tiu jubileo, kiun ni atingis post tiom multe da laboroj kaj suferoj, li nenion pli havas por diri al ni? ĉu en la unua kaj eble ankaŭ la lasta fojo, en kiu ni el ĉiuj partoj de la mondo alproksimiĝis, kiom ni povis, al tiu loko, kie Esperanto naskiĝis kaj kie la atmosfero, saturita de intergenta malpaco per neevitebla natura reago naskis la esperantisman movadon, — ĉu en ĉi tiu grava kaj solena momento li nenion pli havis por diri al ni? Ho ne, miaj karaj amikoj, miaj karaj samideanoj kaj kunlaborantoj! Multe, multe, tre multe mi volus hodiaŭ diri al vi, ĉar mia koro estas plena; en la jubilea momento de la esperantismo mi volus paroli al vi pri tio, kio naskis la esperantisman, pri ĝia esenco kaj espereblaj sekvoj; sed hodiaŭ mi staras antaŭ vi ankoraŭ en rolo oficiala, kaj mi ne

deziras, ke mia privata kredo estu rigardata kiel deviga kredo de ĉiuj esperantistoj. Tial pardonu min, ke mi pli ne parolas.

Kio estas la esenco de la esperantisma ideo kaj al kia estonteco alkondukos iam la homaron la interkompreniĝado sur neŭtralehoma, sengenta lingva fundamento, — tion ni ĉiuj sentas tre bone, kvankam ne ĉiuj en tute egala formo kaj grado. Ni donu do hodiaŭ plenan regadon al tiu silenta, sed solena kaj profunda sento, ni ne profanugin per teoriaj klarigoj.

\* \* \*

Samideanoj! La antikva pola ĉefurbo, en kiu ni kunvenis, pretigis por ni gastaman akcepton, faris multe, por honori nian aferon kaj por agrabligi al ni nian restadon dum la kongreso. Mi esperas, ke, revenante en sian hejmon, ĉiu el vi kunportos kun si plej bonan rememoron pri tiu lando kaj urbo, kiujn la plimulto el vi ĝis nun verŝajne tre malmulte konis. Al la regno kaj lando, kiuj montris al ni sian amikecon, sed precipe al la estraro de la gastama Krakovo kaj al ĉiuj institucioj kaj personoj, kiuj donis al nia kongreso sian moralan kaj materialan subtenon, mi esprimas en via nomo la plej koran dankon. Plej koran kamaradan dankon ni esprimas kompreneble antaŭ ĉio al la senlaca loka organiza komitato, kiu ne ŝparis laboron por la plej bona aranĝo de nia kongreso. Kaj nun mi deziras al vi ĉiuj gajan feston kaj sukcesan laboron.

---

### **La Jubilea Kongreso, Krakovo, Aŭgusto 11—18, 1912.**

---

[Okazis la Oka Kongreso, kiu laŭ la leteroj de ĉiu, kiu havis la privilegion, ĝin ĉeesti, estis brila sukceso. Partoprenis proksimume 1000 delegitoj el ĉiuj landoj, kaj la Aŭstria Ministerio de l' Milito sendis reprezentanton oficialan. Atendante iajn oficialajn sciigojn presotajn en nia plej proksima numero, ni estas feliĉaj, ke ni povas doni la jenan raporton ĝeneralan, afable senditan de nia prezidanto, S-ro H. Bolingbroke Mudie:—]

La vojaĝo de la malgranda karavano, kiun gvidi mi havis la plezuron, estis plene bonega. Dudek unu gesamideanoj kune veturis,

kaj vizitis Rheinvalon, Rothenburg an der Tauber — rimarkindan antikvan ĉirkaŭmuritan urbeton — Munĥenon, Salzburg, Königsee, Bad Reichenhall — U.E.A. somerrestadejon — Wolfgangsee, Ischl, Traumsee, Gmunden, Passau, kaj de tie ŝipire al Vieno.

Dum la tuta vojaĝo ĉiuj konstante propagandis, disdonis ŝlosilojn, kiuj ĉie trovis tre afablan akcepton. Inter la multcentoj da alparolitaj personoj, estis nur du, kiuj nenion sciis pri nia afero!

Alveninte en Krakovon je la 6a matene, ni vidis jam ĉe la stacidomo bone ordigitan akceptejeton, kie ĉiu ricevis tre afablan bonvenigon, kaj konsilojn pri la veturo al la diversaj loĝejoj, kiuj ŝajnas speciale bonaj. Pri la interesaĵoj de la urbo mem mi ĉi tie ne volas paroli, escepte por diri, ke ili ja estas multegaj. Sed unu nova eco de tiu ĉi Kongreso jam hodiaŭ sentigis sin. Sur la muroj estas multe da esperante redaktitaj anoncoj de diversaj komercaj firmoj en la urbo, kaj ĉiu strato havas multajn verdstelajn flagojn, kaj ĉiu tramo estas ornamita per flagoj kaj folioj.

*Lundon* (Aŭg. 12) ni vizitis tiun ĉi rimarkindan urbon, ĉeestis Diservojn en homplenaj antikvaj preĝejoj, kaj vizitis tuin mirindan piramidmonton konstruitan de miloj da Poloj, kiuj alportis po plenmano da tero je memoro de la granda nacia heroo Koscuisko.

Je la unua horo la Prezidanto kaj urbestro de Krakovo proponis al kelkdekoj da niaj reprezentantoj tagmanĝon, dum kiu per multaj afablaj vortoj ili certigis nin pri sia intereso kaj aprobo. Ni ankaŭ dankis, kaj en mia paroladeto kiel reprezentanto de la Britoj, mi atentigis pri la ebla enkondukado de la instruado pri nia lingvo en la lernejojn. Plej notinda estis la Malferma Kunsido, kiu okazis en la plenplenega Malnova Teatro — kiu tamen aspektis tute nova. Unue la Urbestro, aŭ Prezidanto kiel oni lin nomas, salutis nin en bona Esperanta parolado, diversaj eminentuloj de la urbo lin subtenis. Sed la entuziasmo atingis sian plej altan nivelon ĉe la ekstariĝo de la kara Majstro, kies sanstato ŝajnas multe pli bona, ol en Antverpeno. Neniam lia voĉo sonis tiel forta kaj klara, neniam li ricevis tian ovacion, eĉ en Bulonjo. Kvankam li certigis, ke tiu parolado estas lia 'kanto de cigno' ĉe niaj kongresoj, kaj malgraŭ lia esprimita deziro, ke ni ne plu nomu lin Majstro, sed nun konsideru lin kiel 'unu inter la aliaj,' lia amanta armeo lin aplaŭdegadis ĝis la ĉho. Kolonelo Pollen estis la Brita Delegito, S-ro Rhodes lia reprezentanto, kaj mi mem la Vicprezidanto por la Britoj.

Ĉiuj ŝtataj kaj diversnaciaj delegitoj — inter ili Japano kaj Hindo — parolis klarvoĉe kaj sprite, kaj mi devas konstati, ke neniam ni ĝuis tian malferman kunsidon antaŭe.

Vespere okazis oficiala vespermanĝo kaj interkonatiĝo je la naŭa

horo. London matene okazis oficialaj fotografadoj antaŭ naciaj Polaj monumentoj, kiuj bone prosperis, kaj ankaŭ la malferma kunsido de la U.E.A. estis tute sukcesa. Kvankam la Majstro ĉeestis, li nur venis kiel "unu inter ni." Posttagmeze okazis la unua labora kunsido, kiun kelkaj tre timis! Tamen tuj estis vidate, ke nia kutima unuanimeco regas. S-ro Bourlet kiel reprezentanto de Generalo Sebert — kies sano malpermesis lian ĉeeston — faris proponon pri Budĝeto, kiu estis varme aplaŭdata. Oni decidis por tiu ĉi jaro akcepti tiujn Delegitojn, kiuj kvankam elektitaj, ne pagis la kotizon — kaj ĉiu voĉdono ĝis nun estis unuanime. Do mi havas plenan esperon, ke ĉio iros bone de nun.

Vespere okazis vere mirinda jubilea koncerto. Tre rimarkinda virvoĉa ĥoro ĉarmis per Polaj kaj Esperantaj kantoj. Operkantistino devis reveni antaŭ nin fojon post fojo, tiom ŝia dolĉa voĉo nin ĝojigis, kaj Leo Belmont faris tre spritan deklamon.

Certe ĝis nun niaj festoj ja rajtas la titolon Jubilea Kongreso.

*Mardon Aŭg. 13*, okazis matene kunveno de la Lingva komitato. Sed la ĉefa afero estis la forveturo de ĉiuj kongresanoj ĉirkaŭ tagmezo per la plej longa vagonaro, kiun mi iam vidis, al la tridekminute malproksima Salminejo Wieliczka. Ĉi tiu festo estis grandega sukceso. Kanonoj kaj florbukedoj salutis nian alvenon, kaj la kvar aŭ kvin horoj, kiujn ni pasigis en la labirintaj profundegaĵoj de la minejo, estas neforgeseblaj. Multaj dancis en la balsalono 400 futoj sub la tersupro. La lago estis lumigita. Muzikantoj vekis eksterordinarajn eĥojn, kaj ruĝa aŭ blua fajro ŝajnigis, ke ni eniras alian mondon.

Vespere okazis neformala koncerto, sed la bruo de la gemanĝantoj kaj trinkantoj kaj la konstanta enirado kaj elirado de kelneroj nebligis trankvilan aŭskultadon.

*Merkrede, la 14an.* — La dua labora kunsido okazis je la 3<sup>1/2</sup> en la malnova teatro, sed antaŭ ol ĝin priskribi mi aldonos vorton pri la propagando efektivigita en Krakovo. Ĉiuj stratoj estas plenaj je buboj vendantaj Kongresan Bultenon aŭ Lundan Kurieron; ĉiuj plej gravaj restoracioj havas esperante parolantajn kelnerojn, kiuj riĉe rikoltas; la plej gravaj butikoj ankaŭ povas provizi esperantistojn.

Do per ĉi tiu manifestado ni alproksimiĝis ankoraŭ pluan paŝon al la tempo, kiam tiaj aferoj estos nur la atendindaj kaj ordinaraj cirkonstancoj de la internacia vivo.

Malgraŭ niaj timoj, la vetero estas tre freŝa, kaj kelkaj pluvadoj — plejparte dumnoktaj — forigis la polvon, kiu, ĉiuj diris, sufokus nin.

La agada kunsido decidis unuanime prokrasti la demandon pri ĝenerala organizaĵo, kaj aprobis la raporton de la Lingva Komitato. Ĝi ankaŭ decidis ne diskuti pri la temo de ebla unuiĝo inter la



naciaj societoj, sed opiniis, ke tio koncernas nur la societojn mem. Tamen oni aldonis rekomendon, ke la raporto submetita estu studata de la diversaj societoj, kaj ke espereble ili povos iel interrilatiĝi por la bono de la movado.

Vespere la granda teatro pleniĝis kaj la mirinda tragedio "Mazepa" de Slowacki, tradukita de Grabowski, estis majstre ludata. Neforgesebla estis la tuta impresio pri ĉi tiu grandioza teatraĵo, kiu kompariĝas favore kun ĉiuj ĝisnunaj kongresaj prezentadoj.

*Jaŭdo, la 15a*— Maria Tago — estis okupata de Diservoj. La Katolikan Preĝejon Marian vizitis densa popolamaso, kaj belega muzika meso estis sekvata de tre elokventa Esperanta prediko de vera oratoro. Poste, samtempe okazis Hebrea kaj Protestanta Diservoj. Mi celis ĉeesti ambaŭ, sed povis ĉeesti nur la Hebrean, kies muziko religia estis tre altsenta. Ĉiuj estis tre feliĉaj, havi la okazon ĉeestitan Diservon. La rabeno ankaŭ trafe predikis Esperante, kaj la Protestanta pastro ankaŭ same faris.

Profesoro Bujwid proponis gastaman tagmanĝon al kelkdeko da ni kaj vere gajaj ni estis. Sed la plej granda entuziasmo estis vekata de la bela Balo, kun multaj brilaj naciaj vestaĵoj, kiu komenciĝis je la 10a, kaj tre memorigis pri la Kembriĝa Balo en 1907. Antaŭ ĝi, je la kvina horo, okazis premidisdono en la arĥitektura ekspozicio, ĉe kiu nia Londona samideanino, F-ino A. Schafer, gajnis la unuan premion. Mi ankaŭ aranĝis tute neformalan manĝeton konsistantan el barĉosupo, kolbaso pola kaj tortoj, kiun ĉeestis 200 geamikoj tre babilemaj kaj gajaj.

Mi forgesis raporti, ke la parolado de S-ro Ebenezer Howard pri Ĝardenurboj ricevis tre bonan akcepton la antaŭan tagon.

*Vendredon*, okazis la dua labora kunsido de U.E.A. Ĉio iris kontentige, kaj posttagmeze okazis la tria labora kunsido de la Kongreso. Unue, la Komisiono de la 7a Kongreso estis reelektata kun la devo raporti pri la jam ekzistantaj institucioj Esperantistaj kaj la kunordigo de ili; kaj ankaŭ la redakto de regularo por la elekto de oficiroj de la oficialaj institucioj. Unuanime oni aprobis Ĝenovon kaj Parizon respektive por la Kongresoj en 1913 kaj 1914. Ĉiuj decidoj estis unuanimaj. Poste la reprezentantoj por la Konstanta Komitato de la Kongresoj estis elektataj. Tuj post ĉi tiu kunveno, S-ro Parrish faris sian faman paroladon pri Kalifornio kaj montris superbonajn lumbildkliŝojn. Bedaŭrinde nur malmultaj ĉeestis, sed la tuta afero estis vere bonega.

Vespere la opero "Halka" estis kantata de ĉirkaŭ 30 gekantantoj. La Scenaĵoj, orkestro kaj agado estis perfektaj, kaj la muziko estis plene ĉarma kaj melodia. Poste la Majstro, kun sia edzino kaj



filino, akompanis multe da kongresanoj al apuda kafejo, kie granda entuziasmo salutis lin, kaj kie, post "la Espero," oni ludis multajn belajn polpopolajn kantojn.

*Sabato, Aŭg. 17.*— La Lasta kunveno de U.E.A. okazis je la 9<sup>1/2</sup> matene, la ferma kunsido de la Oka posttagmeze. Oni voĉdonis dankon al la *British and Foreign Bible Society* por la intereso, kiun ĝi montris, kaj esprimis la esperon, ke la Nova Testamento en Esperanto estu kiel eble plej frue eldonata.

\* \* \*

Jam la kongresanoj ekdisiras, plenaj je la ĝojo de *vera* jubilea kongreso. Multaj veturos al Zakopane, kie la plej altaj el la Karpataj montoj levas siajn nudajn neĝkovritajn kapojn. Mi kaj kelkdeko da Britoj intencas tion ĉi fari, kaj poste pli orienten veturi. Sed kien ajn ni iros, la memoro de tiu ĉi kongreso kaj la unuanimeco de ĉiuj ĝiaj faroj neniam forlasos nin, kaj se iam okazos momentoj de dubo aŭ de ŝajna malpaco la nura cito de la vorto Krakovo devus ĉion malbonan forigi.

Kompreneble la verkado de ĉi tiuj notoj estas tre interrompita afero dum semajno, kiam mi ĉiam devis celi esti en tri lokoj samtempe. Sed mi esperas, ke ili donos kuraĝon al niaj legantoj, kaj instigos ilin antaŭenpuŝi nian movadon en siaj rondoj tra la tuta mondo.

H. BOLINGBROKE MUDIE.

(El *British Esperantist*.)

---

Entrepreno por la Disvastigo de Esperanto inter Katolikoj. adreso: M. TOURNIER, 17 Cours d'Orléans, á Charleville. (Ardennes-Francujo.)

### Nia celo.

Multegaj katolikoj partoprenas en la ĝenerala movado, en la neŭtralaj grupoj esperantistaj, kaj tute ne zorgas por propagandi Esperanton inter siaj samkredanoj. Tiuj katolikoj *ne faras sian devon*.

Ili ne rajtas, se ili estas vere katolikaj, esti indiferentaj rilate al propagando de Esperanto en katolikaj medioj.

Ni legis tiujn veraĵojn en lasta numero de *l'Espérantiste Catholique*.

Estas por helpi la disvastigon de Esperanto en katolikaj medioj, ke ni starigis tiun entreprenon. Ni esperas vidi baldaŭe esperantistoj katolikaj kompreni la tutan profiton,

kiun ili povus esperi de ĝi. Kaj sekve interesiĝi pri nia entrepreno.

Nia celo, per niaj tutaj fortoj kaj povoj ni klopodos.

Ni estas kaj volas esti antaŭ ĉio katolikoj! Samkredanoj simile vi estu! Helpu nin!

### **Kion ni petas.**

Unue, ni petas vin, ne plu ĵeti la uzitajn poŝtmarkojn, sed ilin kolekti, disigi ilin de la kovertoj per transiro en malvarma akvo, (ne celi por ilin malglui perforte) kaj poste, kiam vi posedos sufiĉan multnombron, sendi ilin poŝte kaj afrankite al nia Entrepreno. (Sendi pakaĵojn kiel presaĵojn, ne taŭgas. — Bone skribu vian tutan adreson sur ĉia pakaĵo.)

Ni akceptas ĉiujn valorajn poŝtmarkojn, sed precipe kaj dankeme altvalorajn kaj tiujn serĉatajn de kolektantoj.

Due, ni petas vin aĉeti niajn poŝtkartojn faritajn per uzitaj poŝtmarkoj. Tutbelaj kaj multstangaj ili ne multe kostas rilate al laboro por ilin fabriki.

Kontraŭ unu respondkupono ni sendas specimonon, por 1 Sm. ni sendas kolekton.

Ni posedas jam pli ol 400 modelojn, kies prezoj divers- iĝas de 4 ĝis 20 sd. po peco.

Antaŭen por Esperanto! Helpu nian Entreprenon.

MAX. ROUB.

---

## Rigardu la Sanktan Hostion.

---

Eltiraĵo el letero adresata de Lia Em. Moŝto la Kardinalo MERCIER, Ĉefepiskopo de Meĥleno, al la Pastraro de Lia Eparĥio.

\*  
\* \* \*

Post kiam la pastro plenumis la ĉefan liturgian agon, la konsakron, kaj kiam, laŭ la rubriko, li suprenlevas la Sanktan Hostion por igi ĝin tute videbla al la ĉeestantaj kristanoj, ĉi tiuj ne restu kliniĝantaj. La suprenlevado estas farata por ili; diru do al ili, ke prave ili humile kliniĝas

dum vi, genufleksante, adoras la saktan Hostion, sed aldonu, ke ili devas sekvi spirite, kaj rigarde, la sanktan Hostion unue, kaj poste la kalikon de la sankta Sango, dum vi ilin suprenlevas super via kapo.

Do, la fideluloj klinas la kapon dum la pastro genufleksas por unua adorado; poste ili relevas la kapon, kaj rigardas al la Sankta Hostio, kiam la konsakranto elmontras Ĝin por ilia adoro. Estas por ili la momento diri la alpreĝon de la apostolo Tomaso: „Dominus meus et Deus meus”. Post tio, la fideluloj povas ree klini la kapon dum la dua genuflekso de la konsakranto.

Tiuj samaj ritoj devas esti plenumataj ĉe la konsakro kaj la suprenlevado de la Sankta Sango.

el „La Vie Diocésaine”  
Januaro 1908.

\* \* \*

### Religiaj Favoroj.

1-e — Indulgenco je sep jaroj kaj sepfoje „kvardek tagoj” por ĉiu fidelulo kiu, kun fido kaj amo, diros la vortojn, latine aŭ alilingve: „Dominus meus et Deus meus”, „Mia Sinjoro kaj mia Dio”, rigardante al la Sankta Hostio, kiam la pastro, dum la Sankta Ofero de la Meso, Ĝin suprenlevas, kaj ankaŭ kiam la Sankta Hostio estas malkovrata ĉe la Sankta Hostimontrilo sur la Altaro.

2-e — Plena Indulgenco gajnebla nur unufoje ĉiun semajnon, por ĉiu kiu plenumos tiun pian agadon ĉiutage dum unu semajno, kondiĉe ke li ricevu la Sanktan Komunion almenaŭ unufoje dum tiu semajno.

„Reskripto de la 18-a de Majo 1907”.

N.B. — Ni proponas presigi tiujn vortojn de Lia Em. Kardinalo MERCIER, aparte, kiel religian folieton. Ke tiuj kiuj dezirus havigi ekzemplerojn por disdoni, sin turnu al la Direktoro de „Belga Katoliko”, S-ro L. HEIDENDAL en ARENDONK. La prezo estos kredeble, po 1 franko por 50 ekzempleroj.

El *Belga Katoliko*.